

Informilo de SES *n-ro 136* ★ 25-a de majo, 2015

Mi sincere salutas al vi, karaj SES-anoj kaj legantoj.

Ĉu vi povas desegni korektan aŭ ekzaktan, nome, la veran formon de nia sankta signo nur per cirkelo kaj liniilo? La formo de la eta stelo staranta supre lumante verde estas ĉarma, sed malĝusta. Estu vi mem iom da tempo Εὐκλείδης (Eukleídēs, angle *Euclid*) por trovi la veran stelon.



La rekto $l$ estu orta al la segmento $AB$ kaj dividu ĝin en egalajn du partojn ĉe la punkto $o$. Metu la punkton $a$ sur la rekton de $l$. $\overline{oa} = \overline{AB}$. La rekto $l'$ trairu la punktojn $A$ kaj $a$. Sur la rekton $l'$ metu la punkton $b$. $\overline{ab} = \overline{Ao}$. Sur la rekton $l$ metu la punkton $D$. $\overline{AD} = \overline{Ab}$. Metu la punktojn C kaj E. $\overline{BC} = \overline{CD} = \overline{DE} = \overline{EA} = \overline{AB}$. Nun ni havas kvin pintojn (la kvin ruĝajn punktojn A, B, C, D kaj E) de la Verda Stelo.

Kirikae H. skribis.